

Mankas la kritika aliro al Esperanto

Rimarkoj pri libro traktanta diversajn alirojn al Esperanto kaj ĝeneralaj konsideroj pri la koncernaj temoj

La arda rekomendo de iu rusa esperantisto en la oktobra numero de *La Ondo de Esperanto* (2019) nepre havi la libron *Aliroj al Esperanto* (Kava-Pech, Dobřichovice 2018),¹ kiun li opinias mirinda, instigis min akiri ĝin kaj legi ĝiajn artikolojn. En la sekvo mi komunikas miajn rimarkojn pri kelkaj asertoj kaj pritaksoj renkontitaj en la tekstoj de tiuj diversaj „ eminentaj “ aŭtoroj, kiun mi formis dum la legado, precipe koncerne historion kaj ideologion. Ĉar en la lastaj jardekoj mi legis ĝissate diversajn artikolojn de tiuj aŭtoroj, kiuj tial estas bone konataj al mi, mi provis ekscii, ĉu iliaj vidpunktoj rilate al la diversaj sferoj de Esperanto iom ŝanĝiĝis, ekzemple ĉu ili fariĝis pli kritikemaj, aŭ ĉu regas la sama blinda (aŭ naiva) entuziasmo kaj ĉu estas reprezentataj en principo la samtipaj konvinkoj kaj argumentoj kiel ĉiam aŭ ĉu oni povas malkovri novajn ideojn.

Kiam mi vidas artikolon, kiu traktas Esperanton lige kun la pacmovado aŭ *pacismo*, mia frunto nature tuj sulkiĝas kaj miaj haroj hirtiĝas. La studo de *Javier Alcalde*² pri la pacismo kaj Esperanto, kiu esence baziĝas sur la materialo aperinta en la ‘Enciklopedio de Esperanto’ (1933) plus kelkaj kromaj verkaĵoj, klare montras, ke la Esperanto-movado estis alĉirita al la pacmovado precipe en la tempo antaŭ kaj post la unua mondmilito, do plej forte kiam Zamenhof ankoraŭ vivis. Cetere, oni devas vere miri kaj bedaŭri, ke la iniciatinto de Esperanto tiam ne ricevis la nobelpremion pri paco, per kio estis maltrafita unika ŝanco honori lin kaj lian verkon. Post la dua mondmilito, kiam la komunismaj landoj sub la gvido de Moskvo uzurpis la pacideon kaj subfosis la internacian pacmovadon, ankaŭ parto de la Esperanto-movado, precipe en la komunisme regataj landoj mem, adoptis la pacretorikon de la orienta bloko, kiu celis, en fanatika kaj abomena maniero, denunci kaj kondamni la „dekadencan“, „putran“ okcidentan „kapitalisman“, „burĝan“ mondon kiel agreseman, militeman monstren, kiu per atom-bomboj celas detrui la pacaman socialisman tendaron. (Ĉu ĝi vere estis pacama estas tute alia demando, ĉar la komunisma bloko celis enkonduki la „socialisman revolucion“ en la ceteran mondon probable per la samaj metodoj de 1917-21 en Ruslando kaj per la sama strategio de la postmilitaj jaroj en la novaj satelitaj ŝtatoj, kion la „libera“ mondo nature volis nepre eviti). Ĝis hodiaŭ oni povas legi en neniu UEA-eldonaĵo pri la sekvoj, kiujn havis la (perforta) enkonduko de tiu socialismo en la koncernitaj landoj: perdo de la libereco, de la demokratio, de la homaj rajtoj kaj de la ekonomia prospero. Tiu malsankta „socialisma revolucio“ kostis verŝajne pli ol cent milionojn da mortviktimoj, inkluzive Ĉinon,³ kie la sovaĝa maoismo kaŭzis gigantan katastrofon al la popolo, do pliaj viktimoj ne estis dezirataj. Multaj esperantistoj kaj en oriento kaj en okcidento subtenis la politikon de la komunismaj partioj kaj senkulpigis la krimojn de la komunismo (pri kiuj ili tamen konsciis) per la argumento, ke ankaŭ la Okcidento kulpas pri enormaj krimoj kontraŭ la homaj rajtoj en la historio de la homaro. UEA toleris la komunisman kurson de siaj Landaj Asocioj en la t.n. socialismaj landoj regataj de poststalinistoj per la apliko de la politika neŭtraleco, ĉar ĝuste en tiuj landoj Esperanto travivis neniam antaŭe vidatan ondon de la populareco, prospero kaj sukceso, kiu estis ebla nur pro la ŝtata apogo, kiu estis kvazaŭ aĉetita de la Esperanto-movadoj en tiuj landoj per senkritika kaj senkompromisa adora subteno de la politiko de la komunismaj partioj. Kritiki la priplorindan situacion de la homaj rajtoj kaj de la mankanta demokratio en tiuj landoj, misformitaj de la stalinisma perversio, estis severe malpermesate en la koncernaj landoj kaj ankaŭ ne venis al la ideo de la „neŭtrala“ UEA-movado en Rotterdamo, kiu mem estis regata aŭ influata de komunistoj kaj simpatiantoj de la socialismo, ĉar ĝi timis, ke ajna ĉi-rilata kritiko povus endanĝerigi la Esperanto-movadon en tiuj landoj. Tiel funkciis la logiko (de la politiko kaj de la paco kaj pacmovado) en tiu tempo, al kiu ankaŭ la Esperanto-movado plene submetiĝis. Dum en la oriento la esperantistoj aktive partoprenis tiun specon de la (cinika) ludo, la okcidenta pacmovado ludis sian propran (naivan) ludon. Kiel konate, UEA silentis ankaŭ pri la faŝismo (ekz. Kolonjo 1933 kaj frankisma Hispanio).

Por reveni al la artikolo de Alcalde, kiu mencias „Mondpacan Esperantistan Movadon“ (MEM) kiel fakorganizaĵon de la Esperanto-movado, kiu unuigas la plej fervorajn pacapostolojn de la komunisma mondo,

¹ Vd. <https://sezonoj.ru/2019/10/recenzo-108>; <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9588>.

² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Javier_Alcalde.

³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/The_Black_Book_of_Communist.

li forgesas konsideri la malsanktan rolon de ĝia (luksa) organo *Paco*, kiu faris nenion alian ol reprodukti kaj disvastigi la cinikan oficialan politikon de la orienta bloko, tordante kaj falsante la faktojn kaj blindigante kaj trompante la legantojn.⁴ Ekzemple la GDR-eldonoj estis redaktataj de Detlev Blanke, la glorata korifeo de la interlingvistiko, kiu politike kontrolis la Esperanto-movadon en GDR, funkciante ankaŭ kiel t.n. neoficiala kunlaboranto de la fifama Ministerio de la Ŝtata Sekureco – ĉi tiun rolon li kaŝis dumvive kaj la fakton mem la Esperanto-movado komplete prisilentas, ĉar ĝi estas tro embarasa.⁵ En similaj maniero kaj tono la oficiala komunisma pacretoriko rezonadis ankaŭ en diversaj aliaj famaj Esperanto-revuoj kiel *Bulgara Esperantisto*, *der esperantist* (GDR) kaj *El Popola Ĉinio*, en kiuj opinioj, kiuj ne kongruis kun la oficiala ideologio de la regantaj komunistoj, ne povis esti reprezentataj. Tiel, ekzemple la tuta tragika historio de la stalinismo kaj maoismo devis esti prisilentata de tiuj revuoj, kiu esence prezentis nur la rozkolorajn flankojn de la komunisma agado. Se oni do skribas frazon kiel *tamen, ĝi* (t.e. MEM) *estis kritikata pro troa proksimeco kun kelkaj registaroj*, tia klarigo certe ne sufiĉas, ĉar necesus rakonti la tutan historion, por ke la legantoj sciu kaj komprenu pri kio temas. Same la frazo *malfacile la Okcidentaj Landoj kunlaboris kun la Orientaj* estas vere stranga, ĉar oni ja povus ankaŭ skribi „kiel sciante, malfacile la Orientaj Landoj kunlaboris kun la Okcidento“.

Kiel ajn do finiĝis la historio de la komunisma pacmovado kaj de la socialismo en la koncernaj landoj, oni povas konkludi, ke la Esperanto-movado en si mem verŝajne faris neniun konkretan historian kontribuon al la monda paco, nek al la homaj rajtoj (almenaŭ al mi neniun konkreta ekzemplo estas konata), kvankam tiu kredo aŭ konvinko estas vaste ankrata en la ideologio kaj propagando de tiu movado kvazaŭ kiel firma mito kaj senmorta legendo. La kontribuo al la paco ne sufiĉas, se kelkaj homoj en internacia kongreso interparolas en artefarita neŭtrala planlingvo. Male, en la komunismaj landoj la Esperanto-movado aktive subtenis la komunisman sistemon, kiu respondecis por senekzemplaj, sistemaj kaj grandstilaj lezoj de la homaj rajtoj. Pro sia integra partopreno en la komunismaj sistemo kaj propagando la Esperanto-movado en la ekssocialismaj landoj devas esti konsiderata kiel senkreditigita, inkluzive Pollandon, la „patrujo“ de Esperanto, kie nun blovas dekstrisma kurso, kiu ne favoras Esperanton. En tiuj landoj Esperanto kaj ties movado, kiu ludis la rolon de aliancano kaj komplico de la komunismaj partioj, pro kio ĝi devis esti konsiderata kiel para-komunisma movado, perdis ne nur siajn reputacion kaj gloron, sed ankaŭ sian aktualecon, eĉ ekster ajna politika kunteksto. Post la falo de la komunismo en tiuj landoj la esperantistaro grandparte elvaporigis, dum la iamaj plej aktivaj adeptoj forpasis kaj kune kun ili ankaŭ la tuta arkaika pacmuziko. Ŝajnas, ke tiuj temoj eniris la historiografion de la Esperanto-movado kiel tabuoj, ĉar ili estas tro malagrablaj, embarasaj kaj maloportunaj por la postko-munisma Esperanto-propagando, kiu fariĝis eĉ malpli kredinda ol antaŭe. Kaj se iamaj prezidantoj de UEA polemikas kontraŭ tio, ke la okcidenta demokratio laŭ ili estas eksportita per armila perforto,⁶ aŭ se diversaj esperantistoj kontestas la validecon de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, oni povas konstati, ke la (politikaj) pozicioj en la Esperanto-movado, gvidata de maldekstraj idiotoj, verŝajne ne ŝanĝiĝis, pri la tradicia malamo de esperantistoj kontraŭ la kapitalismo, angla lingvo, Usono, Israelo kaj pri la tuta prisilentado de la grandstila lezado de la homaj rajtoj en kelkaj restantaj komunismaj landoj kiel Ĉinio, Vjetnamio, Kubo kaj en Irano kaj aliaj landoj kun simila diktaturo, kun kiuj la Esperanto-movado ŝajnas simpatii, oni eĉ ne parolu.⁷

Parenca al tiu malsankta pactemo ja estas ankaŭ la tuta emoci- kaj fantaziplena diskuto pri la „interna ideo“ de Esperanto, kiun traktas la japana interlingvisto *Goro Christoph Kimura*⁸ sub la aspekto de la *lingvo-ideologia aliro*. Bedaŭrinde, la analizo parte estas tro koncentrata al la malnovaj opinioj de bone konataj marksisme orientataj aŭtoroj kiel Lapenna, Blanke, Fettes kaj Corsetti, sed tamen interesa en tiu artikolo estas, kiujn klarigojn liveras japanaj esperantistoj pri ĉi tiu temo, ĉar tio ĝenerale ne estas tre konata. Kiel Zamenhof kaj ties filozofiaj ideoj estis vidataj de la komunistoj, oni scias jam de Drezen, Spiridoviĉ kaj Aleksiev.⁹ Kimura konsideras ankaŭ la ideojn de sciencistoj, kiuj ne estas esperantistoj, kiel tiujn de Michael Silverstein, kiu estas unu el la ĉefaj reprezentantoj de la lingvo-ideologio.¹⁰ Kvankam la klasika „interna

⁴ Vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/PACO_\(revuo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/PACO_(revuo)).

⁵ Vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Stasi_Ulo.pdf.

⁶ Vd. http://www.plansprachen.ch/Demokratiefeindliche_Toene_an_Esperanto-Weltkongress_2014.pdf.

⁷ En simila rozkolora, supraĵa kaj unuflankeca maniero estas verkita la kontribuado de Alcalde pri politikaj aspektoj en la historio de la Eo-movado http://www.rzym.pan.pl/images/Conferenze_141_esperanto_ebook.pdf, kie la situacio de la Eo-movado en la socialismaj landoj post la dua mondmilito estas komplete prisilentata.

⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Goro_Christoph_Kimura.

⁹ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Kiel_Zamenhof_estis_vidata_dela_komunistoj.pdf.

¹⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Michael_Silverstein.

ideo“, kiel Zamenhof ĝin difinis aŭ perceptis (amikeco, frateco, solidareco kaj justeco inter la popoloj, homaranismo), daŭre influas la Esperanto-uzantojn ĝis hodiaŭ, iuj esperantistoj klopodis ‘modernigi’ ĝian komprenon en la pragmatisma senco de „justa, aŭ egalrajta, lingva komunikado“, „lingva egalrajteco“ k.s. Eĉ se neniuj esperantistoj kontraŭstaras tiajn formulojn, Kimura opinias, ke *la uzo de Esperanto ne nepre kondukas al interhoma solidareco kaj amikeco, eĉ se tio vere ofte okazas*. Tamen, *la elekto de tiu neŭtrala lingvo ebligas (relative) egalrajtan komunikadon inter disverslingvanoj*. Hiroyuki Tani, kiu publikigis verkaĵon pri Esperanto kaj tutmondiĝo kaj la problemo de la transnacia lingvo (en japana lingvo, 2003), konsideras, ke *se Esperanto volas esti lingvo de paco, ĝi devas esti lingvo de dialogo kaj ne lingvo de justeco, ĉar lingvo de justeco signifas lingvon de memkontentulo, kiu ĉiam pensas ke nur la propra opinio estas justa kaj prava*. Iom stranga konsidero, laŭ mi, sed eble ĝi estas ankrata en la japana pensmaniero. *Lingvo de dialogo defendas la rajton, ke ĉiuj povas esprimi sian opinion kaj ke ĝi estas aŭskultata*. Laŭ Tani, *do nur tia lingvo povus esti utilo por la paco*. Tani nomis sian sintenon „aktiva neŭtralismo“. Sed Kimura preferas la nocion de la „dialoga neŭtralismo“, *ĉar tio estas neŭtralismo, kiu celas garantii dialogon*. Laŭ tiu kompreno, la ‘komuna tegmento’ de esperantistoj estas la emo dialogi. En tiu sen-co esperantistoj povas esti ‘samideanoj’, eĉ se ili havas malsamajn opiniojn pri iu ajn temo. Kaj Tani aldonis, ke *la Bulonja Deklaracio fakte garantias tian neŭtralismen, do la deklaro interpreteblas kiel manifesto de la ‘dialoga neŭtralismo’ de Esperanto*. Konklude, Kimura vidas Esperanton do malpli kiel movadon, sed multe pli kiel forumon, kie diversnaciaj homoj *subtenas dialogon trans lingvaj kaj aliaj malsamecoj*. Ĉar la pionira kaj postmilita generacio pli kaj pli elmortas, necesus okupiĝi pri la demando, kion pensas kaj kredas pri ĉio-ĉi, t.e. la „interna ideo“, la plej juna generacio, kiu agadas nuntempe en TEJO, ĉar tiu generacio pluportos la movadon aŭ Esperanton entute. Ŝajnas, ke ĉirilataj enketoj mankas.

Se oni legas la tutan ‘artefaritan’ argumentaron pri la rolo de la *interlingvistiko kaj esperantologio*, kiun Detlev Blanke,¹¹ unu el la ĉefaj defendintoj de la socialisma tendaro, prezentis antaŭmorte en plena detala larĝeco, on ne forgesu konsideri, ke tiuj konceptoj neniam estis vere agnoskitaj de la scienco kiel ideoj de memstara disciplino, kiuj trovis ioman atenton maksimume kadre de la ĝenerala lingvistiko aŭ sociolingvistiko. Ĉar la „Esperanto-scienco“ estas agnoskita de neniuj, la esperantistoj fondis propran sciencon kun propraj sciencistoj, kiuj parte agas ankaŭ en la scienco de la „ekstera mondo“. Nur malmultaj lingvistoj ekster la planlingva movado rande okupiĝis pri la temo, kiun ili tamen prijuĝis en principo interesa. Dum iuj lingvistoj nepre pozitive rilatis al Esperanto, aliaj aplikis skeptikan aŭ negativan sintenon. La unuaj estis kutime glorataj kaj festataj de la Esperanto-movado kiel grandaj amikoj de la afero, dum la aliaj estis malafable traktataj aŭ simple ignorataj. En ĉio tio oni kaŝis la fakton, ke la inter-lingvistiko kaj esperantologio servis unuavice kiel ĉefa „milita“ scienca instrumento de la propagando de la Esperanto-movado por idealigi Esperanton supera planlingvo rilate al konkurencaj sistemoj, de kiuj la esperantistoj sentis sin minacataj. Tiel, oni kvazaŭ procedis kun Ido, Occidental, Interlingua kaj aliaj rivaloj kiel la komunistoj traktis siajn „disidentojn“ kiel herezulojn kaj skismulojn en la orienta bloko: per kontraŭbatalado, denunciado, subpremado, prisilentado, ignorado, ekskludado. Hodiaŭ oni ne plu povas imagi la malpacan polemikon de unuj adeptoj kontraŭ la aliaj, kiu siatempe furoris ĝis en la 1950ajn jarojn. Kvankam ekzistas kelkaj daŭrigantoj de la verko de Blanke, kiuj agadas sine de la Societo por (aŭ pri) Interlingvistiko (Berlino), oni devas timi, ke la fako orfiĝis/os per la subita morto de tiu elstara interlingvisto en somero 2016 kaj verŝajne pli malpli malaperos en la estonteco pro manko de aktualeco, kvankam probable ĉiam ekzistos unuopaj sciencistoj, kiuj remalkovros ĝin kaj okupiĝos pri ĝi, same kiel ili interesiĝas pri aliaj elmortantaj ‘orkideaj’ fakoj. Sed, la ‘glo-raj’ tempoj por la interlingvistiko kaj por Esperanto mem ne plu revenos.

Laŭ Orlando E. Raola,¹² la kontribuo de L.L. Zamenhof al la amikeco kaj egaleco *povas tutcerte esti konsiderata kiel grava rimedo cele al la plifeliĉigado de la homaro*. Per tiu konsidero, subtenata per la entuziasmaj pravigoj de Claude Piron, kiu verkis faman libron, en kiu li gloris Esperanton kiel „bonan lingvon“, la eksa kubano vivanta en Kalifornio, kiu apartenigas sin al la Epikura skolo, vidas esencan *hedonisman aliron* al Esperanto. Kvankam mi provas kompreni la ligan de la aldonita „Hedonisma Manifesto“ kun Esperanto, mi ne vidas la sencon, sed Raola ŝajne celas meti Esperanton, en tipe esperantista troigo, idealisme sur filozofie pli altan ŝtupon, kiu garantias, aŭ devus promesi, la feliĉon por ĉiu homo, kiu decidus lerni kaj praktiki Esperanton. En tiu aliro oni povas malkovri la alproksimiĝon al la religia, aŭ almenaŭ psi-kologia aliro al Esperanto, kiu estas pli ol dubinda, ĉar en iuj kazoj Esperanto povas ankaŭ kaŭzi gravan personan seniluzi-

¹¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Detlev_Blanke.

¹² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Orlando_Raola.

iĝon, kiel tio verŝajne okazis al sennombraj homoj, kiuj forlasis Esperanton. Necesas ĉiam prilumi ambaŭ flankajn konojn de la medalo.

Ĉar la ceteraj temoj traktitaj en la libro estas pure lingvistikaj kaj ne estu komentataj de mi, mi haltas ĉi tie. La rekomendon de la rusa esperantisto en *La Ondo de Esperanto*, ke tiu libro, en kiu cetere mankas kontribuado pri la kultura aliro al Esperanto, estas *nepre havinda en biblioteko de ĉiu esperantisto*, mi tamen trovas troigita aŭ vana, ĉar por 'simplaj' averaĝaj esperantistoj la tekstoj estas verŝajne tro specifaj (aŭ fakaj) kaj altnivelaj.

Se fine *Humphrey Tonkin*,¹³ la ĉefa korifeo de la Esperanto-movado post Lapenna kaj iusece dojeno de la Esperanto-literaturografio, en sia *historia aliro* turnas kelkajn signifajn malnovajn historiografiajn verkojn de Esperanto, kiujn li jen nomas ŝlosilaj, aŭ pri kiuj li esprimas skeptikon, tien kaj reen, por fine lamenti, ke *mankas esperantista perspektivo al la historio ĝenerale*, por aserti, ke *la nerekonno de la multlingvismo tordas la perspektivon*, li forgesis mencii almenaŭ tri gravajn aspektojn de tiu perspektivo, kiujn laŭ mia opinio necesus pli forte konsideri: a) la Esperantan merkaton (kiu evidente fariĝas pli kaj pli malforta lige kun la kreskanta ekzistokrizo de la Esperanto-movado), kiu devus celi publikon, kiu amase aĉetus librojn, kiuj koncernas ankaŭ neesperantistajn temojn; b) la interreton, kies signifo pli kaj pli kreskas; c) la *kritikan aliron* al la Esperanto-historiografio. La reinterpretado de la „fenomeno Esperanto“, kiun kun Tonkin ŝajne ankaŭ Lins trovas *neevitebla kaj salutinda*, jam okazas ekzemple en kelkaj verkaĵoj de Künzli (kies nomon Tonkin tamen mencias dufoje), kiujn li publikigis, tute private kaj neoficiale, en la interreto kaj kiuj aperas en neniu interlingvistika bibliografio.

La ĉefa konkludo pri la publikigita artikolaro, kiu estas sendube brile kaj modele verkita (kiel la estoj kutimas diri), do estas, ke la aŭtoroj en la esenco daŭre reprezentas pli malpli la samajn vidpunktojn pri Esperanto kiel lingvo kaj movado, sed oni kapablas lerte paki la malnovan vinon en novajn tubojn.¹⁴ Ion alian oni ne povas atendi. De jardekoj ĉiam la samaj Esperanto-fakuloj skribas pli malpli la samon pri la samaj temoj kaj tiel monopolas la opiniojn. Alia konstato estas, ke oni ankaŭ ne tiris la konsekvencojn el la kritiko farita en la lasta tempo. La problemo de tiuj homoj estas, ke ili ignoras ĉian kritikon, ĉar kritiko skuas ilian mondkoncepton, pro kio ili eĉ ne unu sekundan dubas, ke iliaj konvinkoj, asertoj kaj rakontoj estas pravaj. Pro tio ankaŭ la preparolata eldonaĵo devas esti konsiderata kiel integra parto de la tradicia Esperanto-propagando, eĉ se ĝia karaktero estas sciencnivela, ĉar esence mankas la kritika traktado de la prezentitaj temoj. Aŭtoroj kun kritika sinteno mankas, estas ignorataj kaj eĉ ne ricevas la inviton kunlabori, same kiel en aliaj projektoj gvidataj, favorataj aŭ financataj de UEA- kaj ESF-proksimaj fortoj, eĉ se la koncernaj materialoj aperas en aliaj eldonejoj. Cetere, la komunistoj praktikis la saman manieron de ignorado, prisilentado kaj ekskludado de „ideaj malamikoj“. Tia fanatiko de iluziaj konvinkoj nepre kondukas al ideologia idiotismo. Do, nur kiam la Esperanto-movado forlasos la tradician dogmeman propagandon kun ĝiaj tipaj troigoj kaj fantazioj kaj kun ĝi ankaŭ la maldekstrisman, alternativisman kaj sekteman ideologian sintenon kaj kiam ĝi komencos serioze konsideri ankaŭ aliajn opiniojn, oni povas esperi, ke ĝi estos konsiderata kiel serioza movado. Dume ekzistas neniu espero, ke tiu scenaro okazos, ĉar ne ekzistas aŭtoroj, kiuj alirus la temojn de Esperanto laŭ alispeca aŭ alitipa, t.e. pli kritika maniero. Ŝajnas do, ke Espe-ranto ne estas alimaniere alirebla.

A. Künzli, aprilo 2020

¹³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Humphrey_Tonkin.

¹⁴ Pli bone estus diri 'malvarma kafo', ĉar la ruzaj Eo-popagandistoj povus interpreti 'malnovan vinon' kiel tre bonkvalitan, valoran kaj veran aferon kaj 'novajn tubojn' kiel modernan koncepton.